

## AVENO #44 - Verdaj Partioj & Esperanto - 2018

Gravaj dokumentoj, pri verdaj rezultoj, okazajhoj, rilato inter la Verdaj Partioj kaj Esperanto

Estus bone se samideanoj el diversaj landoj sendu la raportojn pri siaj Verdaj Partioj. Mi petas pardonon, ke la elekto estas iom hazarda, kaj chefe temas pri Europo.

==

2018-10-29 elektoj en Luksemburgo, Germanio kaj Kanado - gajno de Verdaj Partioj en Luksemburgo la antaŭa registaro povas daŭrigi dank al pli bona rezulto de la Verda Partio.

Pri Claude Turmes mi plurfoje raportis - li laboris por Amikoj de la Tero kaj dum pluraj jaroj estis kompetenta EU-parlamentano pri energio; aktuale en Junio ighis shtata sekretario pri naturmedio.

Verduloj estis sukcesaj en germanaj federaciaj landoj:

En Bavario la Verda Partio ricevis duoblan kvanton (laŭ %) da voĉoj, 17,5%.

Tie ili prezentis programon por ekologia kaj ekonomia daŭripovo kaj sociala harmonio. Bedaŭrinde SPD kontraste draste malgajnis, estis en koalicio kun la kristana partio, CSU, kiu ankaŭ draste perdis voĉojn.

Pro la nesukcesa respondo al la problemoj de la civitanoj, pli ol 10% voĉdonis por la populismaj ekstremdekstruloj-kontraŭ-EU-uloj.

La maldekstruloj ne sukcesis superi la sojlon de 5%, kion finfine sukcesis la Liberaluloj.

En Heslando la Verda Partio ricevis pli ol 19% kaj povus daŭrigi la saman koalicion kun la CDU (kristan-demokratoj).

Ankaŭ en Kanado la Verda Partio avancis. Krom Elizabeth May en la shtata Parlamento, nun pluraj estis elektitaj al la regionaj aŭ urbaj konsilioj, jen iomete pli (en la angla - ilia pagho ankaŭ estas en la franca):

[www.greenparty.ca/en/news/3](http://www.greenparty.ca/en/news/3)

= =

2018-07 Sciencistoj atentigas troan populacion

Ili postulas, ke laŭ la kapacito de la nia globala sistemo Tero ni devus tendence redukti la kvanton da homoj. Ne per militoj (nuntempe chefe internaj militoj kausas morton kaj mizeron) sed per sagha redukto de la infanoj po familio.

[www.scientistswarning.org/](http://www.scientistswarning.org/)

2018-07 novaj Euro-Parlamentanoj en la Frakcio Verduloj/Regionalistoj.

Claude Turmes ighis shtata sekretario pri daŭripova evoluo en Luksemburgo; en EP li estis tre aktiva specialisto pri regajneblaj energioj.

Tilly Metz sekvas lin; ŝi estis iama urbeŝtrino kaj instruistino je LTPES pri socialaj sciencoj. Ŝi laboros pri industrio, esplorado, energio.

Jan Philip Albrecht ighis ministro pri agrikulturo, natur-medio energi-shangho kaj digitaleco en la germana Ŝlesvig-Holŝtejnio.

Romeo Franz sekvas lin; li estas profesia muzikisto kiu engaghis por la civitanaj rajtoj de la etnoj de Sinti kaj Roma. Kiel EP-ano li engaghighos pri tiu, kaj laboros en la komitato pri interna merkato kaj konsumanto-protekto.

(en 3 lingvoj: de, en, fr) [www.greens-efa.eu/de/our-group/abgeordnete/](http://www.greens-efa.eu/de/our-group/abgeordnete/)

= =

2018-05-19 AVE che Konsilio de Europaj Verdaj Partioj

trio de AVE partoprenis la ideo-foiron je Sabato kaj montris la potencialon de Esperanto. Georgo Sossois raportis (iomete koncizigita de Manfred):

Mi alvenis jam vendrede, povis negoci por senpaga eniro kaj por meti la materialon al

la akceptejoj, kaj sukcesis grandan redukton de 180 al 60 Euro.

Tiel, ni povis aranĝi la salonan budon sufiĉe frue. Ĉar ni havis multe da materialo mi sukcesis ricevi plian tablon.

Do, ni tri, ekde la komenco, organizis nin por ke ĉiam estu iu por ricevi vizitantojn - bone funkciis. Fotisto de Greens prenis foton de la budo.

Posttagmezo ankau alvenis Gerd de FEL.\*

Persone mi parolis pri E-o kun mia europa deputito (Lamberts) kaj al kelkaj gejunuloj de Groen che la akceptejoj. Ankau kun la espereble estonta urbestro de Antverpeno Wouter van Bezien. Sed ne estis tiom da homoj kiom en Parizo. .

\*) koran dankon por Georgo, Ronaldo, Piet kaj Gerd kun la esperantistoj en Antverpeno, kiuj pruntedonis al ni bone elektitan gamon da materialo.

- -

2018-05 Europaj Verdaj Partioj prezentas sian charton en Esperanto kaj 24 aliaj europaj lingvoj:

La listo de la tradukoj estas tute sube, Esperanto #1!

<https://europeangreens.eu/node/5745>

Bedaurinde la aktualaj Manifestoj okaze de elektoj por la EP tie nur trovigas en la angla; tradukon en Esperanton vi trovos sur nia retejo (1-a pagho): [verduloj.org](http://verduloj.org)

- -

2018-04-15 Hungario denove elektas Orban - Verduloj sukcesis eniri la parlamenton Lehet Mas a Politika gajnis 6,99% .

Bernadett Szel reprezentos la verdulojn en la Parlamento - Gratulon al tiu malfacila posteno.

Ilia retpagharo en la hungara: <https://lehetmas.hu/>

==

2018-03-27 GroenLinks plej favore elektita en 13 nederlandaj urboj

Vi povas rigardi la intervjuon kun Jesse Klaver:

<https://europeangreens.eu/news/jesse-klaver-be-movement-change-europe>

2018-03-23 Elizabeth May (MP, Kanado) malliberigita pro protesto:

Shi, la gvidanto de la Verda Partio kaj iama kandidatino por prezidento, protestis kontraŭ nafto-dukto trans la montaro en British Columbia.

Post la samtaga liberigo shi argumentis, ke la firmao Kinder Morgan ne atendis la jurkortuman decidon pri tiu naftodukto, kaj tial rajtas protesti kune kune kun la regionaj indigenaj popoloj, i.i. Skvamish\* , kiuj defendas sian rajton kaj hejmlandon.

Ne-perforta civila ne-obeemo estis la sola ebleco por ili - ĉar ekz-e pri klimato-shangho ĉefe afliktas nature vivantajn popolojn.

(unue laŭ informo sur Fejzbuka pagho de Global Greens)

<http://elizabethmaymp.ca/publications/2018/03/23/non-violent-civil-disobedience-is-not-the-easy-choice-but-its-the-right-one-says-elizabeth-may/>

\*) eble vi iam legis la faman paroladon de tribestro de Skvamish, Seattle, en la jaro ch. 1856.

==

**2018-01-17 Francio, rezignas pri nova flughaveno apud Nantes - Gratulon al Verduloj kaj naturamikoj**

Notre-Dame-des-Landes estas urbeto okcidente de Francio, situanta en la regiono de Loire-Atlantique, regiono Pays de la Loire. La projekto konstrui flughavenon sude de la urbo estis lanĉita en 1960. Neaktiva pro la petrolo-krizo de la 1970-aj jaroj, ĝi reviviĝis en 2000. Fine de 2007, la projekto konfirmiĝis, malgraŭ la anonco de la haltigo de iu ajn kreado de flughaveno farita dum la renkontiĝo « Grenelle de la naturmedio » en Parizo de tiu sama jaro. La dekreto formaliganta ĝin estas publikigita la 10-an de februaro 2008.

La projekto havas defendantojn, kiuj diras, ke ĝi estas rimedo por ekonomia evoluo. Sed ankaŭ ekzistas multaj kontraŭuloj kaj forta mobilizo, kiu kreskis dum la lastaj jaroj. Ĉi tiuj kontraŭuloj diras, ke la projekto estas netaŭga (la nuna flughaveno, situanta proksime en la urbo Nantes, jam estas maltro uzata), ke ĝi estas malŝpara, forigos terkulturajn laborpostenojn, kaj detruos la lokan naturan medion. Ĝi tuŝas unu el la lastaj heĝaj kamparaj areoj en malseka terpeco en Francio. Ekde sia komenco, la projekto estis la temo de multaj diskutadoj kaj peripetioj.

La 17-an de januaro 2018, la projekto konstrui novan flughavenon estis definitive forlasita. Necesis 50 jaroj por faligi ĝin.

Unu el la aktoroj de ĉi tiu mobilizo, Eŭropa Ekologio La Verduloj (EELV), publikigis ĉi tiun gazetaran komunikon, kiu substrekas ĉi tiun ekzemplan sukceson, akiritan post longa batalo. EELV estas franca ekologio partio. La persistemo ĉiam pagas .

Jen ligo al la plena artikolo de la Esperanto-Komisiono ene de EELV:

<https://esperanto.eelv.fr/2018-la-persistemo-pagas-ciam/>

==